


SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
· FONDITA EN 1918 ·



Fondinto: «Avoto», Kunfondinto: J. W. Leslie.
Honoraj Prezidantoj : «Avoto», Norman Booth, Kolonelo
D. H. Davis, L. J. Van Gulck,

Prezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7, Constable Road Ipswich, Anglujo
Sekretario: J. K. HAMMER, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando
Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21, Brookfield Avenue, Waterloo,
Liverpool 23, Anglujo
Redaktoro: PASTRO H. A. ROODACH, Nergt. 37c, Kristiansund n.,
Norvegujo



Karaj greskoltoj!
La somera tempo finiĝis, nova laborsezono komencas. Al mi - kiel vi jam scias - tio signifas laboro en nova kaj fremda medio. Tial mi iras al tiu vintro kun sufiĉe da strangaj sentoj, ĉar mi ne scias en kiom granda amaso la laboroj venos.
La transloĝo ne okazis sen malfacilaĵoj - el kiuj niaj norvegaj membroj bedaŭrinde suferas: La transporta firmao lasis mian SEL-arkivon inter la paroĥaj paperoj, kaj nur en septembro mi povos ricevi ĝin. La norvegaj membroj do ne ĝis tiam ricevos la pasintan numero de LSM. Pardonon!

Ankaŭ al la estraro de SEL mi devas peti pardonon, ĉar mi ne kontaktis ĝin kaj ne ricevis ilian konsenton al la eksperimento kiun signifas tiu ĉi numero.

La tro longa tempo inter mia forsendo de la manuskriptoj kaj la ricevo de presita numero ne estis agrabla, kaj kiam la ŝanco montrigis presigi la numeron tie ĉi, mi kaptis ĝin. Sed mi ne konas la kvaliton de la laboro. Se ĝi ne estas akceptebla, ni reiros al la pli frua presejo.


La formato de tiu ĉi numero estas iom pli malgranda ĉar en Norvegujo oni uzas la A-formatojn, la kontinentan standardon.

Por la lasta numero de la jaro mi atendas manuskriptojn ktp. ĝis la 10, de novembro kiel ordinare.

Korajn salutojn

Hans Amund.

Mi hontas. Sed promesas plibonigon de la kvalito venontfoje.



OFICIALA ĜRANO DE SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Volumo III, n-ro 22

3a jarkvarono 1967.

U.K.

Pro la fakto ke milito en Mez-oriento okazis, oni nuligis la planitan kongreson en Tel-Aviv kaj organizis eksternormalan en Rotterdam, kun sufiĉe bona sukceso.

Tamen, ĉar multaj Esperantistoj ankaŭ turiste vizitas la kongresojn, ne ĉiuj, kiuj anoncis sin por Israelo ankaŭ venis al Rotterdam, kaj nederlandanoj kiuj ne intencis iri al Israelo ofte jam faris aliajn planojn por sia libertempo. Ankaŭ mi mem jam preparis tendumadon en la orienta parto de nia lando, sed feliĉe mi sukcesis partopreni du tagojn: la 3an de Aŭg. por la SEL-kunveno, la 5an por la laborkunveno de la unua sekcio de UEA pri fak-asocioj.

SEL fakte ne kunvenis. Dum kelkaj horoj diversaj personoj en- kaj eliris la salonon kaj kun ili mi agrable babilis kaj diskutis. Inter ili estis Pietro Rizzi, la unua reprezentanto de SEL en Italujo en la jaroj 1920-30.

La laborkunside de la unua sekcio, sub prezido de I. Lapenna, estis pli grava. Montriĝis, ke nia malgranda SEL vere ne malbone funkcias se oni komparas kun aliaj fak-asocioj. Tamen ni

certe povas pliboniĝi. Kelkajn manierojn por tio mi necios, kaj mi esperas ke vi povas pripensi kion vi povas fari.

1. Utila estus la aliĝo de ĉiu SEL-ano kiel individua membro de UEA.

2. Tiuj kiuj vere estas kapablaj, estu Fakdelegitoj pri Skoltismo en sia urbo, prefere se ili estas almenaŭ skoltestro.

3. Esperanto kaj nia organo, "La Skolta Mondo", estu la rimedoj per kiuj ideoj, opinioj kaj diskutoj pri skoltismo disvastiĝu tra la mondo. Ni nepre traduku interesajn artikolojn por LSM, - kaj inverse, traduku el LSM por niaj naciaj skoltgazetoj.

4. Farinte tion, ni postulu, ke oni aldonu la mencion "Tradukita el Esperanto" kaj ne "Tradukita el L.S.M.", kiu estas sen signifiga se oni ne scias, kio ĝi estas.

5. Se iu povus proponi ian agadon en kiu nia lingvo kaj Ligo ludas rolon, kaj en kiu samtempe ne-esperantistoj povus partopreni, kaj kiu estus vere utila por ili, tio estus tre bona propagandilo por ni.

6. La SEL-anoj ĉiuj en propra urbo kaj regiono laboru por SEL. Al naciaj ĉefestraroj oni tamen nur skribu a) se oni estas skolto aŭ prefere skoltestro, kaj b) post interkonsilado kun la Nacia Reprazentanto. Prefere LI skribu mem, apogita de la aliaj membroj en sia lando.

7. Al la Monda Oficejo en Ottawa skribu nur la anoj de la Centra Komitato, kiuj estas konataj tie.

Cetere mi ricevis multajn gratulojn pro la SEL-budo en la Monda Ekspozicio en Montreal, kiun kelkaj vidis aŭ prikiu ili aŭdis, kaj oni admiris la novan insignon kiu havas pli oportunan formaton kaj

kaj formon ol
laŭtaŭa.

Mi mem kun
gojo memoros
la renkontojn
kaj speciale
volas saluti
amikon Umberto
Barelli, kiu
skribis tre
utilan leteron
al s-ro Rizzo.
Mi jam ofte
rimarkis la
gravan kaj
fervoran lab-
oron de la Itala Esperanto-Junularo por nia afero.

J.K.Hammer.

En la skolta pavilono nia stando estas sufiĉe pro-
ksima al la centra tendego.
Oficiale ĝi estas stando de Skolta Esperantista
Ligo, kiu ja estas ligita al la skoltmovado, kiel
ankaŭ al UEA. Sed SEL estas tre malforta organizo
rilate al la nombro de membroj kaj financoj; tial
ĝi iĝis projekto de Montreala klubo kaj KEA.
Expo 67 mem donas enirpermesilojn por la deĵorantoj
en stando, kiu vere havis nenian oficialan rektan
rilaton kun ili.
Plej grave, ni ekinteresis multajn personojn. En
ekspozicio kun la temo "La homo kaj lia mondo" ni
sukcesis starigi reprezentadon de la mondlingvo de
la Homo! (El "LUMO")

Ĉu vi jam motis viajn ^{esperantojn} ?



P R P A G A N D I L O

La Nederlandse Vereniging voor Vreende-
enverkeer (La turistasocio) eldonis kaj
ribuis konversacio-kalendaron kun Esperanta-
rlanda tekstoj, simplaj kaj ĉiutagaj frazoj.
Ĝi nun pendas en la turistinformejoj en
lando.


Informis TEJO.

Odvar Strand

K I E N

El la norvega tradukis Hans A. Rosbach

Jenan rakonton verkis en 1935
triam 17-18 jara skolto.



J U M B O

Erik haltis antaŭ la garderobo kiam li aŭdis sian nomon. Estis Håkon Mörk kiu parolas.

"Aĥ, Erik! Tiu pala legemulo ne povas rapidi, aŭ ĉu? Li kuras kiel testudo kiu havas vundon sur ambaŭ kalikoj."

- "Ho, kia mirinda testudo" iu murmuris, sed tria lin superis:

= "Erik bone scias kuri. Li ja kuris je la patrinaj jupoj post kiam li estis tiel eta."

Ili salutis la eldiron per ridaĉo. Erik ne toleris aŭdi pli, sed rapidis al la kurejo. En la gorgo li sentis ion gran'dan. Tiel ili ĉiam konduktis al li. Ĉiam, ĉiam oni traktis lin kiel metaŭgulo, hejme kaj ekstere.

- "Ne, tion Erik ne povas fari" la patro kutimis diri. "Li estas tro senhelpema."

- "Mi ne kredas, ke vi povas kuniri sur tiu ekskurso, Erik," diris patrino. Ĝi estos tro streĉa, kaj la aliaj knaboj ja estas tiel sentimaj."

Nu - honeste: Li apenaŭ sentis emon kuniri, sed panjo ne bezonus ĉiam esti tiel tro timema pro li...

"SED NUN MI MONTROS AL ILI!"

Erik subite komprenis, ke li parolis laŭte, kaj ruĝiĝis. Feliĉe neniu atentis. Tamen, tie staras ja viro kiu ridetaĉas. La knabo malfide rigardis lin.

Ses knaboj nun vetkuros, knaboj dektri=dekkvar-jaraj. Nur Håkon Mörk kaj

Odd Sten estis pli ol dekkvin, jes, Håkon eĉ baldaŭ estis dek ses. Kutime ili kuris ĉirkaŭ la strata kvarumo hejme kiam ili konkuris, sed hodiaŭ ili volis provi sur Bislet. Håkon decidis, ke ili kuru dufoje laŭ la kurejo, do 800 metrojn. La aliaj faris laŭ lia decido, kiel ĉiam - kiel ili ferus kiajn li proponus. Se Håkon decidis ke ili ŝtelu pomojn, ili faris. Se li volis vetkuri sur Bislet, neĥiu protestis.

Erik aspektis decidema, kiam li iris al la starta streko. Nun li volas venki super la kamaradoj. Nun ili vidu la testudon kun vundoj sur la kalkanoj, ĉa knabo kiu kuras je la juĝoj de la patrino. Nun li montros ke li, la sentaŭgulo, superas ilin!

Li trofruis dufoje, kaj la aliaj, kiuj ordinare ne troatentis tiajn konkursojn, subite tre atentis. Ili moke demandis, ĉu li havas pulojn, li ja ne povis trankvili. Aŭ eble panjo promesis sukerpeĉeton al li se li unue envenis.

Fine ili ĉiuj ekkuris. Erik tuj preterkuris la aliajn kaj unuis. Li kuris sen iu pripenso, kun la nura ideo esti antaŭ la aliaj. La vento susuris ĉirkaŭ lia neforta korpo.

Estis unika sento esti la unua - tiom longe kiom tio daŭris. Sed la knabo baldaŭ komprenis, ke li startis tro forte. La koro komencis frapegi, la spiro mallongigis kaj pli kaj pli abruptis.

Jam la unua preterpasis lin. Estis Harald, lia plej bona, la sola vera amiko lia. Kial eĉ li ne malenviis la venkon de Erik? Tio signifus tiom por li, nun....

Sed post Harald venis aliaj, Håkon, Odd. La tuta aro da knaboj. Meze en la dua ĉirkaŭo Erik estis la lasta, kaj li ĉiam pli malantaŭis.

Samtempe la antaŭo estis streĉa. Håkon kaj Harald kuris unu apud la alia, kaj neniu el ili vólis cedi. La enkurego estis brilega, kaj meritis pli da rigardantoj ol la nenionfaremuloj kiuj envenis por rigardi. Håkon venkis. Li ja estis pli aĝa kaj pli forta. Preskaŭ sengenita de la kuro li iris al la konkurento. Li estis alta kaj fortika, kun malhela hararo. La vizaĝo estis strange pala.

- "Vi farigos vere bona" li iom memfida ~~parol~~ kapsignis al la kamarado.

Erik envenis sufiĉe post la aliaj. Odd akceptis lin kun rida grimaco.

- Ho, kiom vi pligrandiĝis post kiam vi startis, Jumbo. Vi jam devas komenci kun longaj pantalonoj."

Kaj tiel Erik ricevis la malfeliĉan moknomon Jumbo. Ĉiuj tuj akceptis ĝin, kaj la tutan hejmvojon li audis nenion alian.

- "Ho, ke Norvegujo havas kurgeniulon kiel Jumbo!"

- "Jes, Jumbo konas la teknikon. Nur komenci kvazaŭ Nurmi kaj poste nur pli-rapidi."

Fine li ne plu eltenis. - "Mi havas devon, knaboj," li diris, kaj foriris laŭ flankenvojo. Li aŭdis ilian ridegon, ĝi estis kvazaŭ vipofrapo. Nur kiam li jam pasis kelkajn stratangulojn, li sentis ke li spirogas. Li estis tuj apud St. Hanshaugen, kaj laca kaj malbonhumora li eniris kaj sidiĝis sur benko. La pensoj li -

kuris lian cerbon, pezaj kaj malamaj.

Nu, li estas Jumbo, li? La aliaj do estas pli bonaj ol li? Ho, ne, nur atendu, nur atendu....

Reve li havis grandajn viziojn. Li vojaĝos eksterlanden, li fosos oron, spekulacios, fariĝos nekredeble riĉa, kaj tiam li ja revenos al Norvegujo. Tiam la aliaj knaboj certe flatos, tiam li ne plu estos Jumbo.

-"Erik!"

Li surpriziĝis. Harald staris antaŭ li.

-"Kion vi volas?" li demandis, kaj ĉagreniĝis ĉar lia voĉo estis tiel ne-vireca. "Lasu min pace!" Li iom pli forte aldonis.

-"Ni iom interparolu" diris la kamarado, kaj ekiris laŭ la grazvojeteto. Erik iom dube sekvis.

La interparolo malfluis en la komenco. "Vi ne devus - vi ne devus tion atenti la incitadon. La knaboj ja ne seriozas, kompreneble. Ili nur daŭrigas ĉar vi tiel facile ofendiĝas".

-"Mi ne ofendiĝas".

-"Ho, jes. Kaj oni ne bezonas okulvitrojn por vidi tion."

Ĉifoje Erik ne respondis. Li nur subite haltis, turnis sin por foriri. Al li mem tiu movo ŝajnis grandioza, moke disiga, sed Harald akceptis ĝin kiel nova pruvo de la ofenditeco de la kamarado, kaj prenis lin je la ŝultro.

-"Nun aŭskultu!"

-"Lasu min. Mi ne bezonas infanvar-tistinon."

-"Jes, vere vi bezonas. Vi..."

- "Lasu min, mi diras!"

Ili restis dum momento kaj mezuris unu la alian, spitemaj kaj furiozaj, ambaŭ. Erik vidis antaŭ si tipan knabon, alta kaj rokreskita maldika, ĉar li estis meze en la kreskaj jaroj, sed plenplena da sano. La vizago bruna de suno; ĝi kutimis brili je ĝojo. Sed nun ĝi estis malĝoja. La ~~ĉir~~ hela harbuklo pendis neordigita ^{sur} la frunton. La nudaj genuoj havis vendojn post grimpado en arboj kaj trans bariloj.

Harald, tamen, vidis tromalfortan, palan ulon, kiu havas nigrajn ombrojn sub la okuloj pro tro multe da legado. La vizago estis neforta, kaj la ofendita grimaco je la buŝo donis al ĝi mizeran impreson. Kia stultulo! Tiel ploremi kiel knabino. Sed Harald sciis, ke la kamarado tamen povas esti la plej afabla kaj reala amiko de la mondo, kaj vere, la knabaro kondukis aĉe al li hodiaŭ. Neniam krom Erik ili mokis pro malvenko, kaj tiu nomo: "Jumbo!". Ne estas strange, ke li malbonhumoras. Harald volis lin defendi kontraŭ la aliaj, sed neutile kiam Håkon Mörk ne cedis.

- "Nur tion mi volis diri, Erik, ke vi povus venki, se vi ne startus tiel troforte. Vi ja eluzigis post la unua duona cirkaŭo. Post iom da praktikado tio pliboniĝos, kaj nun ni du provos iom kune."

- "Ho, kiel afable. Ĉu vi kredas, ke mi iom pretendas en tiu vetkuraĉo? Tiam kredu duan fojon. Adiaŭ!"

Li fortiris sian brakon, kaj forrapidis. La amiko fiksrigardis post li.

- "Nun vi vere kondutas kiel jumbo!" li vokis, furiozega.

EN LA "KAVERNO" DE HÅKON

Jumbo kulis sur la divano kaj legis krimromanon. Mi nun uzas lian kromnomon, ĉar la kamaradoj preskaŭ forgesis lian veran nomon. Nur hejme ili ankoraŭ diras Erik. Eĉ Harald nomis lin Jumbo, ne el malico aŭ incitemo, al tio li estis tro bona amiko, sed kromnomoj facile alĝuas, kaj certe neniu sciis, kion doloris tio, kiam ĉli vokis al li per ĝi. Li ĉiam sentis: Nun ili diras, ke mi estas la plej maltaŭga, la plej malinteligenta kaj malsignifoplena el ĉiuj. Dum monatoj la nomo kiun la knaboj donis al li, ĉasis lin, kaj nun li preskaŭ ne estis eksterporde pli ol dum la liberaj kvaronhoroj kaj survoje al aŭ de la lernejo. Kiam li revenis post la somerferio, kaj komencis en la dua klaso de la mezlernejo, li ja esperis ke la kromnomo oni ne plu memoras. Sed tute vane. Lia nomo ankoraŭ estas Jumbo. Kaj tiam li retiriĝis tute al la libroj, kaj en ilia mondo liaj propraj zorgoj malaperis. Li vere travivis tion, kion li legis, kaj en lia imago li estis la heroo kiu ordigis ĉion. Kiam li finlegis libron, li kuŝis longtempe kaj revis pri la estonteco, kiel li fariĝos io. Li ne dubis eĉ dum momento, ke li havas ian ekstran talenton - eĉ en sportoj, jes, eble precize en sportoj. Se li nur povus ekzerci, li ja montrus! Sed tio devas okazi sekrete, ĉar li ne volas aperi kiel netaŭgulo. Ne, kiel MAJSTRO li surprizigos la mondon. Sed bedaŭrinde nur en la revoj.

Li subite haltis en la legado. Sonoris je la enira pordo, kaj nun patrino malfermas la pordon. Harald venas.

Rapide li kasis la krimromanon, kaj prenis volumon de Ibsen. Ne malbone, ke la amiko povas vidi, ke li havas "pli altajn interesojn", kiel diras la instruisto de norvega lingvo.

Patrinon ĉiam genas la vizitoj de Harald. Ŝi ne povas forgesi, ke li estas filo de riĉa direktoro, kaj estis hontige montri al tiu la malgrandan duĉambran loĝejon.

"Pardonu ke ne ĉio estas en bonordo, sed ni ne atendis fremdulojn" si diras, kaj nerveme frobis sian neĝe blankan antaŭtukon.

"Nu, mi ne estas fremdulo," ridis Harald, kaj eniris al Jumbo. "Kaj vi kompreneble legas, kiel ĉiam, librovermo."

Li sin ĵetis sur la divanon.

"Bonagajn novaĵojn! La lerneja konkurso de sportoj okazos post unu monato, en la komenco de oktobro. Arne arangis tion."

"Nu?"

Jumbo ŝajnis tiam seninteresa, ke la koro ion falis en Harald. Oni ne povas, ŝajne, interesigi la knabon. Sed Harald ne tuj cedis.

"Ni havas konkurson kun alia lernejo, kaj nun ni devas trovi nian lokon en la konkurso. Mi esperas je kvarcentmetra vetkuro, kaj vi devas provi la centmetran."

"Mi? Vi ne imagas, ke mi partoprenos la konkurson?"

Laŭ la tono oni povus kredi, ke Erik ne volis fari ion tiam hontigan, sed li vere sentis sin flatita.

"Mi ja ankaŭ ne havas ŝancojn" li almetis, nur por aŭdi protestojn.

"Puh! Kuniru al Bislet tuj. La komitato elekta estas tie, ĉiuj el la tria klaso, kaj ni devas ekoni ilin frutempe."

Sed la amiko ne volis kuniri. Li jam tro bone konas la rezulton. "Rigardu al Jumbo!" ili vokos.

"Nun li partoprenis en la lerneja sporto. Li faros novajn mondrekordojn." Tiel ili incitos lin ĉiutage, kaj tiam pli bone ne iri.

Harald devis foriri vane. Kaj Jumbo retrovis la krimromanon. Sed li ne plu povis rekti siajn pensojn al ĝi. La humoro estis je la nulo, kaj fine li eliris.

Li grimacis, kiam li elvenis el la domo. Altaj domoj, polvo kaj veturila bruoj, trista grizo - aĥ, fi! Devus esti kiel en la libroj, kun ĉiamaj eblecoj por noblaj agoj. Ho, kiel li batalus kontraŭ la danĝeroj kaj malfacilaĵoj! Sencie li pasis rekte al ili.

En la strato li renkontis du knabojn, Håkon Mørk kaj Odd Sten. Li volis preteriri, sed ili haltigis lin.

"Matenon, Jumbo", diris Håkon tiom afable ke la knabo ne kredis la proprajn orelojn. "Harald vizitis vin, laŭdira."

Ili restis, interparolis, kaj Jumbo benumorigis pro la kamarada tono kiun la ambaŭ uzis. Li ne alkutimiĝis al tio el tiu flanko, kaj li havis strangan senton, ke io sin kaŝas maltantaŭ la troa afableco. Kelkfoje li intencis foriri, kaj se li tion estus farinta, li ne travivus la aventurojn, kiuj en la alvenonta tempo iĝis la ĉiama streĉo, tage kaj nokte.

"Odd" subite diris Håkon, "ĉu ni montru al Jumbo mian kavernon?"

Nun Odd surprizigis. Dum momento la tuta estaĵo kaj la longa vulpa vizago rakontis pri tio. Li ne komprenis al kio tiu afableco servas, sed li ĉiam agis laŭ la deziro de Håkon.

"Nu, ja," li diris iom nedecide.

"Via kaverno? Kio estas tio?" Jumbo demandis senkomprene.

"Nu, ejo en la kelo, kiun mi ŝanĝis al privata loĝejo," ridetis Håkon. "Ĝi tre taŭgis al konferancoj, kaj nun mi deziras paroli kun vi pri io. Venu - ne estas irintaj! Harald estas vera fanfaronulo."

"Ho? Tion mi neniam rimarkis". Tio falis el Jumbo. "Kiel?"

"Se vi nur aŭdus kiel li iun tagon priparolis la multajn unikajn valoraĵojn ili posedas ĉe li. Oni emus vomu. Sed imagu mian ridegon, kiam li priparolis libron kiu valoru pli ol mil kronojn."

"Sed li pravas", protestis Jumbo, ema por defendi Harald. "Mi mem vidis ĝin. Estas valorega unuaeldono kiun multaj kolektantoj frenezas posedi."

Strange - Håkon ne aspektis negaja pro tio ke la mensogo de Harald tamen estis vera. Kontraŭe - li ege interesiĝis.

"Ankaŭ mi ŝatas malnovajn librojn", li diris, "kaj mi emus vidi tiun. Sed Harald certe ne ŝatus kunpreni min hejmen. Li ja tiel snobas."

Jumbo emis protesti. Nekredeble, ke iu povas pensi tiel pri Harald, kiu estas tiom afabla. Håkon ŝajne ne ŝatas, ke la alia posedas pli ol li, li ja ne povas kasi ke li mem ne multe riĉas. Stulte sin okupi pri tio!

Kiam ili preterpasis kelkajn angulojn, Håkon eniris tra pordego.

"Ĝi tie mi loĝas," li diris. "Ĝis la, Odd. Vin mi renkontas en la vespero. Nun mi interparolos nur kun Jumbo."

Odd restis senkomprene. Håkon vere kondutas pli kaj pli strange. "Ĉis" li acide respondis, kaj foriris.

Ankaŭ Jumbo ne komprenis. Kial Håkon afablis al li? Li kutime estis la plej granda malafablulo. Kaj pri kio li parolos? Ĉu li pripensas iujn malbonaĵojn?

Sed Håkon aspektis senkulpa kiel ŝafido. Li iris en la koridoron, kaj malfermis pordon. "Jen la enirojo al la kelo."

La scivolo igis Jumbo'n sekvi lin. Li atendis surprizojn, sed nenio okazis. Ili malŝlosis kelan ejon, kaj sidiĝis sur seĝaĉoj.

La nomo "kaverno" estis bona. La ejo estis malgranda, sed tipe knaba. Håkon estis lerta, kaj mem faris la meblaron: Tablon, du longajn benkojn kaj grandan librobretaron plenplenan da ĉifonitaj libroj. Sur la muroj pendis bildoj de popularaj filmherooj. Entute la kaverno impresis - pensis la unu kaj duonan jaron pli juna Jumbo - tre infaneca.

"Jes, estis pri la fama libro de la patro de Harald mi volis paroli kun vi," komencis Håkon. "Komence mi konsideris ĝin mensogo, sed decidis demandi vin. Vi komprenas, min treege interesas malnovaj libroj kaj ĉiaj antikvaĵoj. Ĉu vi povus peti de Harald permeson, ke mi rigardu la libron? Mi ne volis pli paroli pri tio dum Odd auskultis, tial mi kunprenis vin ĉi tien."

Jumbo iom seniluziigis. Tio do estas la klarigo de la kamarademo de Håkon. Li antencis utiligi lian amikecon kun

Harald.

"Mi preparolos tion morgaŭ en la lernejo",
li diris.

"Dankon! Tio vere estas afabla."

Ili interparolis iom pri io ajn. Tiam Jumbo volis rigardi la librojn. Inter ili li trovis skatolon.

"Kio estas tio?" li demandis, kaj deprenis la kovrilon. Subite Håkon sin ĵetis al li kvazaŭ tigro, ĥiris lin per la brako kaj forprenis la skatolon de li. Sed li jam vidis kio estis en ĝi: Belega, antikva ponardo kun stranga ŝtono en la tenilo.

"Kio estas?" demadis Jumbo. Li komprenis nenion.

Håkon faris palan ridetan grimacon.

"Mi timis, ke vi povus ĝin perdi kaj detruiri la tenilon. Kiel mi ĵus diris, mi vere frenezas je antikvaĵoj. Kaj tiu ponardo estas tre malnova.

Li remetis la kovrilon kaj volis remeti la skatolon, sed subite li ekhavis ideon. Nun li forturnis sin, por ke Jumbo ne vidu la streĉitan vizageŝprimon.

Li konscias, ke li nun ekfaras ion malbonan, kaj hontas jam antaŭe. Kvankam lia konscienco portis multon, li ĝis nun neniam kondukis fie al kamarado. Sed nun li devas, li diris defende al si mem. La cirkonstancoj devigas lin...

"Aŭskultu" li diris per voco preskaŭ nere-konebla. "Ĉu vi volas fari al mi servon?"

"He - ja - certe - se mi povas..."

Håkon sidigis sur benko kaj metis la kubutojn sur la tablo.

"Mi ne dirus ĉi tion al ĉiu ajn, sed vi estas reala," li komencis, bone sciante ke flato estas la plej bona maniero gajni iun.

"Kaj mi ja ne devus ĝeni vin per tio."

Li sajnjis nedecidema, ekstaris, kaj pasis tien-reen sur la planko. Lia nervozo impresis al Jumbo. Li sentis novan tonon en la "kavernon". Ĝi estis pli malluma kaj malvarma.

Fine Håkon elverŝis tion, kion li gardis en sia koro.

"Nur estas, ke ni ne tro bone fartas ĉe ni. Panjo malsanas, kaj ni eĉ ne havas monon por sanigiloj. Né bezonas monon rapide, kaj nun mi ekpensis, ke mi povas vendi la ponardon. Mi heredis ĝin de onklo, kaj ĝi estas vere valora."

"Sed pri kio povas mi helpi" demandis Jumbo, kiun la konfidemo konfuzigigis.

"Per la vendo de la ponardo. Ĉar mi devas morgaŭ viziti familion ie ~~sur~~ eksterurbe, kaj nur revenas en la vespero. Estas tiom grava afero, ke mi devas lasi la lernejon, kaj tute ne povas trovi tempon por tiu vendo, kvankam ni bezonas monon por medikamentoj kiel eble plej frue. Ĉu vi povas afable ordigi tion? Jen mi skribas la nomon de antikvaĵvendejo."

Li skribaĉis adreson sur peco da papero, kaj donis la pecon kaj la skatolon al Jumbo. Tiel rapide tio okazis, ke Jumbo ne trovis tempon protesti. Krome la rakonto pri la malsana patrino de Håkon impresis tiel, ke li sentis sen devigita helpi. Se estus lia propra patrino.... La penso doloris. Kaj la helpo ne estis tre granda.

"Jes, mi faros tion," li brave diris, kaj Håkon superŝutis lin per dankoj.

Iom poste ili forlasis la "kavernon", kaj disiris ekster la pordego.

"Vi do vizitos min morgau vespere," Håkon adiaue diris, kaj volis eniri. Sed subite li ekmemoris ion. "Vi ne bezonas meccii la libron al Harald ankoraŭ"-

Jumbo estis tre maltrankvila tiun vesperon. Li ne komprenis kial, sed sentis ke la vendo de la ponardo donos malagrablajojn.

"Stultajo" li fine murmuris. "Mi ne estas tiel netauga, ke mi ne povas helpi amikon."

Kaj dum momento li sin sunbanis en la fiero, ke nur li estas elektita por tio.

Vi estas reala amiko, estis la vortoj de Håkon.

L A A N T I K V A P O N A R D O

Jumbo haltis antaŭ ekspozicia fenestro. Jen la butikoj al kiu Håkon doni la adreson. Li rigardis la aĵojn ene. Antikvaj vazoj, ringoj, cenoj, horloĝoj, strangaj armiloj, mistikaj eburaj figuroj - mallonge rica elekto de ĉio, kio igas kolektanton preni la monujon. Ankaŭ la knabo kutimis senti la carmon de tiaj ekspozicioj, sed nun li ne povis forskui la senton de malbono. Eble pro la pluvo kiu torentis kaj forigis la homojn el la stratoj. Kvankam li suprenlevis la kolumon de la nigra pluvmantelo kaj malsuprentiris la capelon gis la okuloj, li sentis sin trae malseka.

Jen li rapidis en la butikon. Se li sin turnus en tiu momentu, li estus vidinta konatan personon elirantan el pordego.

Jen Håkon - kiu ja devas esti ekster la urbo en tiu momento. Li aspektis tre nervema.

Maljuna, afabla viro akceptis Jumbon ĉe la vendeja benkego, kaj demandis kion li deziras. La knabo ne tuj respondis, sed li antaŭentiris la longan, platan skatolon de sub la mantelo.

"Mi - mi nur volis aŭdi, ĉu vi volas aĉeti ĉi tiun?" li balbutis ĝenite, kaj donis la ponardon. La antikvaĵisto ridetis afable, kaj iris al la fenestro por esplori ĝin. Håkon, kiu staris ekstere kaj rigardis enen, retiriĝis. Neniu el la du rimarkis lin.

La nejunulo esploris la armilon per plej granda atento. Fine li metis ĝin sur la vitrinon, kaj rigardis Jumbon pripenseme.

"Momenton" li diris. "Mi ne scias precize kiom mi povas pagi."

Kaj li iris en alia ĉambro kaj fermis la pordon. Tamen Jumbo aŭdis, ke li deprenis la telefonan mikrofonon kaj dialis numeron. En la sama momento flustris voĉo ĉe la enira pordo: "Rapidu, Jumbo! Lasu la ponardon kaj venu tujege!"

"Ĉu vi, Håkon?"

"Venu tuj, mi diras!"

"Sed...?"

"Rapidu, idioto!"

La voĉo de Håkon estis tre malklara pro ekcitiĝo, kaj kiam Jumbo fine obeis kaj venis sur la straton, li bruteme prenis lin je la brako.

"La oldulo metas policon sur nin. En la pordegon tie!"

Polico. La vorto kaj la maniero en kiu Håkon diris ĝin, ŝetis ondon de histeria timo super Jumbon. Li komprenis nenion, nur ke li devas foriri. Rapide! rapide!! Kiel frenezulo

RECENZO.

Cent Himnoj. Tradukitaj kaj eldonitaj de pastro Hans Amund Rosbach. 62-paĝa. Enhavas indeksojn de la himnoj kaj Notojn pri la aŭtoroj de la originalaj himnoj kaj pri la komponintoj de la melodioj, indikitaj je la kapo de ĉiu himno. La libro estas havebla ĉe la eldoninto (Nergt. 37 c, Kristiansund N, Norvegujo.) Prezo n.kr 10.



La aspekto de la libro estas tre plaĉa kaj la preslitteroj tre klaraj. La Antaŭparolo estas en poezio. Ĝi indikas la deziron de la aŭtoro, ke Kristanoj komune kantu al la Sinjoro per la internacia lingvo. Estas himnoj de adoro, himnoj taŭgaj por la festoj kaj la eklezia jaro, ankaŭ por Bapto, Geedziĝo kaj ĉe Entombigo; por infanoj kaj junuloj (du por skoltoj) kaj por ĝeneralaj okazoj. Ĉe ĉiu himno estas indikita la nomo de la verkinto de la originalo.

Handikapon mi havas por tiu recenzo, ĉar mi ne scias, eĉ ne konas, la Norvegan lingvon; ankaŭ la granda plimulto de la melodioj estas tute nekonataj al mi. Mi do ne povas komenti pri la ĝusteco de la tradukoj, nek ĉu la himnoj estas kontentige kanteblaj. Mi povas prijuĝi la himnojn nur "de ekstere".

El propra sperto mi scias, ke la Esperantigo de nacilingvaj himnoj ne estas tre malfacila afero. Tre facile oni faras uzon el rimoj per "adasismoj" aŭ per pronomoj, aŭ per pronomoj kaj la vorto "Dio". Jen verdikto de sveda amiko mia, kunlaboranto sur la himnara

kampo: "Tiuĵ tute ne estas rimoj, nur tedigas la tekstojn kaj metas ilin sur tro malaltan poezian kaj literaturan nivelon." C.H. havas multajn pronomrimojn.

Trovigas aliaj makuletoj. Ekzemple:

a) Neklaraĵoj. Ĉe 21, 1/1,2 (= n-ro 21, strofo 1, linioj 1 kaj 2) aperas

Iru nun via ago,
agu Dion je honor'.

Oni devas cerbumi, por trovi ian signifon el tio. (Rim de red.: Preseraro, elfalis "al": Iru nun al via ago.)

b) Neĝustaj ritmoj. 7,7/1 neĝusta akcento sur Baptujo, 10, 4/2 havas unu silabon tro, simile ĉe 7/3 en sama himno. Kontraŭe mankas silabo ĉa 76,2/2 kaj 80,2/6.

c) Malbonaj vort-apudigoj. 18,1/6 "el regn' malluma. 86,2/1 "ter-enigm' sin solvos" (en traduko pruntita de Magda Carlson). Se oni provas prononci ilin, la sono similas al supremata terno!

d) Tre ofta uzo de -as, -is, -os kun signifo estas, estis, estos. Zamenhof avertis kontraŭ tio, kaj mem faris ĝin nur tre, tre malofte, kaj nur en poezio aŭ proverbo.

Tiu uzo estas des pli kritikinda, kiam la koncerna radiko estas verba, kiel ĉe 36,1/3 senmovas (kaj 84,4/5). Je unua vido la formoj estas sensencaj.

e) Gramatikaj eraretoj. Post verboj esprimantaj deziron, preĝon, neceson, intencon, la verbo en la subpropozicio devas havi la finajon -u. Ankaŭ post "por ke". (34,9/1, 36,3/7, 38,2/4 kaj aliaj.) 21,3/6 "unun" estas kontraŭ-


regula. Oni uzis ĝin pro klareco, sed ĝi estas evitebla per reanango de la vortordo. 44,2/5 "humilas nin" estas gramatike nepermesebla.

f. Estas unu dubinda neologismo 17,1/4 "funkas".

g. Estas multaj preseraroj.

Mi volas, ke mia kritiko de la libro forte akcentu la altan valoron kaj dezirindecon de ĝi. Ĝi ebligas tre interesan kaj inspiran envidon en la kant-trezoron de la Eklezio en Norvegujo. Ĝi certe estas tre bonvena aldono al nia Kristana literaturo, kaj ĝi peros benon kaj ĝojon al ĉiuj, kiuj uzas ĝin. Dankinda kaj gratulinda estas Pastro Hans A. Rosbach.

W. L. Jones.



KORESPONDU

Hercilia Ribiera Affonso deziras kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiaj temoj. Ŝatokupo: kolektado de poŝtkartoj. 49-jara dommastrino, skoltino. Adreso: Av. Governador Jose Malcher, 321 - Belem - Para - Brazilo.

Maria Aparecida Ribeiro Affonso, 17-jara lernantino, skoltino, adreso kiel supre. Dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj tempoj. Filatelio.

Maria de Nazare Arruda de S. Rodrigues, 14-jara lernantino, skoltino, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Ŝatokupo: Sporto. Adreso: Rua Farias Brito, 104 - Belem - Para - Brazilo.

Denise B. C. Menezes, 12-jara lernantino kaj skoltino kun Ŝatokupo popolmuziko, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Adr.: Rua Farias Brito, 22 - Belem - Para - Brazilo.

INSIGNO

Pro la amikeca helpo de SELano 168 ni nun posedas novajn insignojn, rondajn kun blanka fono kun verda stelo. En la stelo nia emblemo. Diametro 12 mm (brita 1/2"). Havebla en tri modeloj:

- a. Kun rekta pinglo.
- b. Kun fermita pinglo, kiel broĉo.
- c. Kiel butono.

Prezo: po 6 steloj (t.e. 3!sh en angla, 1.50 ned. guld.) Indiku la deziratan modelon, kaj kunsendu afrankon.

KOTIZOJ

Ni ankoraŭ havas la malaltajn kotizojn, kaj multaj miris pro tio. Sed tiuj estas

informataj, ke neniu kaj nenio malhelpas aŭ malpermesas, ke ili pagu pli. La ligo certe bezonas la monon. Ankaŭ ne forgesu la Kapitalan Fonduson, kies rentumoj estas uzataj por SEL, kaj la Paul-Blaise-memorfondaĵo, kiu helpas al SELanoj, kiuj ne povas mem pagi kotizon aŭ abonon.

H E L P U

Por helpi decidigi pri enkonduko de Esperanto inter skoltinoj en Rockhampton, ĉiu Esperantista skoltino en la mondo bonvolu tuj sendi nur salutkarton al:
Rockhampton Skoltinoj, ĉe S-ino Watson,
Commissioner Girl Guides, Brae Street,
Rockhampton, Queensland, Australio.

* * * * *

Skolto estas distinita por servi kaj savi sian proksimulon.

Tio ne ĉiam signifas, ke oni tiru dramanton el rivero aŭ homon el brulanta domo. Tio ankaŭ signifas, ke ni respondu favore je alvoko de internaciaj organizaĵoj, kiuj helpas aliulojn.

Ekzemple oni povas per 1\$ sirmi 100 infanojn kontraŭ tuberkulozo. 100\$ ebligas disdonon de kvindek mil porcioj da pulvorlakto. Dank'al donaco de ducent dolaroj 5 flegistinoj povas ĉeesti perfektan kurson dum tri monatoj.

Unu el la asocioj estas UNICEF - kaj kiam vi skribos viajn kristnaskajn salutojn vi povas helpi simple per uzo de iliaj salutkartoj.

Oblikvanta Hipopotamo.

NACIAJ REPRESENTANTOJ.

- Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd.,
Surrey Hills, E 10, Victoria.
- Brazilo: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante
Tamandare 979, Belem, Para.
- Britujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street,
Oldham, Lancs.
- Danlando: S-ro Sejer Holgersen, Einarsv 99, Lyngby
- Finnlando: S-ro Seppo Tella, Pieni Roobertink,
4-6M70, Helsinki 13.
- Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia
32, Zaragoza.
- Italujo: S-ro Pietro Ferrara, Via Brione 10, Torino
- Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.,
16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.
Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave.,
Roxboro, Quebec.
- Anglo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, Kalembelembe
no 225, St. Jean, Kinshasa.
- Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxuustr 7, Zaandam.
- Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt 37c, Kristiansund
- Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes
17-3^oDt^o, Lisboa I.
- Svedujo: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.
- Usono: S-ro Larry A. Greene, 1115, Sewanee Drive,
Chattanooga, Tenn., 37412.

